Jarkunveno de Grupo Esperantista de Trondheim, 19an de februaro 2013 ĉe Kjell Heggvold Ullestad, Utleirtunet 28 D, Risvollan

1. Aprobo de la kunvoko
La kunvoko aprobiĝis.

2. Malfermo de la jarkunveno
Prezidanto de GET, Torstein Kvakland, malfermis la jarkunvenon.

3. Aprobo de la tagordo
La jarkunveno aprobis la tagordon.

4. Elekto de kunvena prezidanto, raportanto kaj 2 subskribontoj de la protokolo
Torstein Kvakland elektiĝis kiel kunvena prezidanto. Kiel raportanton oni elektis Jardar Eggesbø Abrahamsen. La protokolon subskribos Herman Ranes kaj Judith Parelie Abrahamsen.

5. Jarraporto 2012
Oni laŭtlegis la jarraporton, faris kelkajn malgrandajn modifojn kaj fine aprobis ĝin.

6. Jarkalkulo 2012
Kasisto Ulf Stenhaug prezentis la jarkalkulon. La kasisto raportis ke li finfine sukcesis fermi nian konton en Handelsbanken, tiel ke nia mono nun estas nur en DNB (Postbanken). Revizoro Jørgen Åldstedt akceptis la jarkalkulon kaj prezentis sian raporton. La jarkunveno aprobis la jarkalkulon.

7. Elektoj
La elekta komitato ne ĉeestis kaj ne prezentis proponon. La jarkunveno mem diskutis la aferon kaj elektis tiel:

Prezidanto:	Torstein Kvakland (reelekto)
Kasisto:	Ulf Stenhaug (reelekto)
Sekretario:	Jardar Eggesbø Abrahamsen (reelekto)
Estrarano:	Herman Ranes (reelekto)
Anstataŭanto:	Christian Fossen (reelekto)

Revizoro: Jørgen Åldstedt (reelekto)
Kunordiganto de la vortara projekto: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la biblioteko: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la arĥivo: Torstein Kvakland (reelekto)
Elekta komitato: Jørgen Bosoni (reelekto) kaj Kjell Heggvold Ullestad (nova)

8. Envenintaj proponoj
Neniu propono envenis.

9. Fermo de la kunveno
La prezidanto de GET dankis pro la fido kaj fermis la jarkunvenon.

Post la jarkunveno okazis kafklaĉo.

Ĉeestis 8.
Raportis: Jardar Eggesbø Abrahamsen

Subskribis: Herman Ranes Judith Parelie Abrahamsen

Styret på norsk

Under sak 7 på årsmøtet i Grupo Esperantista de Trondheim (Trondheim esperantoklubb) 19.2.2013 vart dette styret valt:

Leiar: Torstein Kvakland
Kasserar: Ulf Stenhaug
Sekretær: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Styremedlem: Herman Ranes
Vara: Christian Fossen

Referent: Jardar Eggesbø Abrahamsen

Underskrivarar: Herman Ranes Judith Parelie Abrahamsen